
2.ª Ep. AÑO III, N.° 16 (152) NOVIEMBRE-DICIEMBRE 1965

Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA



"Peregrino de la Paz". Pablo VI habló en las Naciones Unidas. Su transcendental discurso, modelo de humildad y sabiduría, fue un llamado a la Paz por la comprensión, que merece el aplauso de todos los hombres de Buena Voluntad, con independencia de sus opiniones religiosas o políticas.

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Direktoro: Domingo Martínez Benavente

Redakcia Komitato:
Angel Salete
Nicolás L. Escartín
Emilio Gastón

ADRESOJ:

Hispana Esperanto Federacio
Prezidanto:
Dro. Miguel Sancho Izquierdo
Str. Torre Nueva, 30, 1.º
ZARAGOZA

Ĝenerala korespondado:
Sekretariino:
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35, 4.º Dcha.
ZARAGOZA

Monsendoj:
Kasistino:
María Pilar Gómez
Str. Bolonia, 14, 1.º
ZARAGOZA

Sendaĵojn pri statistiko kaj informado al:
S-ro. Salvador Aragay
Str. Arce, 8
CORNELLÁ (Barcelona) Hispanio

Libroservo:
Sekretariejo de H. E. F.
P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha.
Ĉekkonto: n.º 14114, Banco de Bilbao
ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 100 ptojn.

de secretaría

Con motivo de nuestro Congreso Nacional de Esperanto, la Directiva de la Federación envió, desde Palencia, con fecha 20 de julio, una carta al señor Secretario de las Naciones Unidas, manifestando la adhesión y firme apoyo de la Directiva y miembros de H.E.F. a los esfuerzos de la O.N.U. para la intensificación de la colaboración internacional.

Atenta contestación a esta carta se recibió en la Secretaría de H.E.F., con fecha 30 de julio, del Jefe de Gabinete, señor Narasimha, en nombre del Secretario General.

Estamos llegando al final del año 1965, y si como ciudadanos del mundo, los esperantistas españoles hemos trabajado por ayudar a esa colaboración internacional, como esperantistas no hemos cumplido nuestra misión.

U.E.A. organizó la recogida de firmas para la propuesta que al finalizar este año se ha de presentar a las N. U. en pro del Esperanto. H.E.F. ha distribuido, entre sus miembros, gran número de hojas con la copia de la Propuesta en español, para la recogida de firmas. El Presidente de la Federación nos ha dado el ejemplo en la labor a realizar, nuestro compañero Nicolás L. Escartín, con sus artículos orientadores, nos ha facilitado el trabajo, aclarando toda duda; y nosotros, ¿qué hemos hecho? A excepción de en algún caso aislado, muy poca cosa para lo que pudimos hacer; nos hemos limitado a comentar la valía y actividad de nuestro Presidente y lo bien que escribe L. Escartín, lo adecuados y en su punto que están sus artículos acerca de la Colaboración Internacional, sin darnos cuenta de que el tiempo pasa y hay que colaborar internacionalmente para lograr el triunfo del Esperanto.

Todavía se está a tiempo, si lo dicho hasta ahora no ha sido bastante para ir a la cabeza en el porcentaje de firmas recogidas, hagámonos a la idea de que estamos en una competición internacional y logremos hacer subir ese 1,92 por mil en que nos hemos parado, y así como cuando la selección española de fútbol juega un partido ponemos todo nuestro entusiasmo junto al televisor o radiorreceptor como si con ello pudiéramos ayudar a nuestros jugadores, dediquemos un día, el tiempo que dura un partido de fútbol, a recoger firmas, y estad seguros de que España, donde hay una gran mayoría de simpatizantes con el idioma internacional, podrá superar todavía ese 1,92 por mil, que dice tan poco en favor nuestro.



KOMUNIKAĴO DE LA PREZIDANTO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Je la komenĉiĝo de la tria jaro de mia prezidanteco mi opinias utila doni al la publiko, responde al pluraj diverslokaj deziresprimoj, mallongajn informojn pri la nuna agado de la Akademio.

La unua jaro (1963-1964) estis dediĉita al la revizio de la Statuto, al la interna reorganizo kaj al provoj starigi en la akademianaro pli justan reprezentadon de la diversaj lingvofamilioj.

En la dua jaro (1964-1965) la Akademio esploris du ĉefajn demandojn, kiuj jam de longe atendis ian solvon, tiun pri la uzado de la pasivaj participoj kaj tiun pri la gramatika kategorieco de la radikoj; pri ambaŭ estis jam atingitaj decidoj: pri la unua demando, la plimulto de la Akademio konstatis, ke la ekzemploj entenataj en la «Fundamento» ne povas esti klarigataj laŭ la tiel nomata «nete tempa sistemo» sen arbitra perforto de ilia senco; pri la dua demando, la plimulto konstatis, ke la Esperantaj radikoj havas unu gramatikan karakteron kaj ke la analizo de De Saussure, kompletigita de Wüster kaj de Kalocsay, respondas al la realaĵoj de la lingvo.

La koncernaj Sekcioj (pri Gramatiko unuflanke, kaj pri la Komuna Vortaro aliflanke) nun prilaboras la tekston de la definitivaj rezolucioj pri tiuj du demandoj. La ceteraj Sekcioj, pri la Teknika Vortaro, la Bibliografio, la Prononcado kaj la Literaturo pretigas nun raportojn pri temoj poste esplorotaj de la Akademio.

La Prezidanto,
G. Waringhien

Nova adreso:
182-G, Av. Rouget de Lisle
Francujo

PREMIO COMELLA - BASSOLS (SEPA KONKURSO)

VERDIKTO

La Juĝa Komisiono por la Premio COMELLA-BASSOLS deklaras ke pro la plej alta nombro da poentoj atingitaj en ĉijara Konkurso la konkursaĵo PEDAGOGIA FIASKO, verkita de Sr.º Gabriel Mora Arana, el urbo Manresa-Katalunujo (Hispanujo) estas gajninta la Premion.

La Juĝa Komisiono gratulas la gajninton kaj dankas kore ĉiujn partoprenintojn.

—Clelia Conterno, Lluis Mimó, N. Machperson kaj Francesc Vilà, Sekretario.



VIIa ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN MOLINS DE REI

La 10an de oktobro de la kuranta jaro okazis kun granda sukceso en Molins de Rei, la VIIa Barcelono-Provinca Esperantista Renkontiĝo. Ĝin organizis H. E. F. kun la Protekto de la Urbestraro kaj kunlaboro de la lokaj esperantistaj grupoj. La renkontiĝon partoprenis proksimume tricent esperantistoj kaj inter la Esperanto flagoj oni povis vidi tiujn de la reprezentantoj de Barcelona, Vilafranca, Villanueva y Geltrú, Tarrasa, Sabadell, Tarragona, Manresa, Valencia, El Ordal, k.t.p., k.t.p.

En la paroĥa preĝejo oni celebris diservon kun prediko en Esperanto kaj kataluna de nia samideano Pastro Claramunt. Poste oni vizitis la Muzeon kie dank'al la afableco de Sro. Madorrell, ĝia direktoro, oni povis admiri inter aliaj vidindaĵoj belan portreton de la kreinto de Esperanto. En la urbodomo oni faris oficialan solenan akcepton kaj la urbestro Sro. José Vilagut Llogut adresis afablajn bonvenajn vortojn al la partoprenantoj de tiu interesa renkontiĝo kaj samtempe profitis la okazon por anonci la decidon de la urbestraro doni la nomon de Esperanto al unu el la plej novaj stratoj de la urbo. Al liaj afablaj vortoj respondis nia Prezidanto Dro. Sancho Izquierdo, kiu poste brile prelegis pri la temo «Esperanto, realiganto de la Kristanaj idealoj en la Jaro de Internacia Kunlaboro», en la sidejo de la Juventud Católica. La prelegon ĉeestis krom la multnombra publiko la lokaj aŭtoritatoj, la Honora Prezidanto de H. E. F. Dro. Herrero, la Prezidanto de la Hispana Esperanto Junularo Sro. Aragay, kaj la Delegito de U. E. A. en Hispanio Sro. Molera, inter aliaj konataj aktivuloj de nia movado. Pri la Renkontiĝo raportis interaliaj la revuoj «Diario de Sabadell», «TeleXpres», «Diario de Barcelona», «Llobregat», k.t.p. Tiu ĉi lasta revuo faris interesan intervjuon al nia Prezidanto.

En la kadroj de la kultura programo de tiu Renkontiĝo oni faris konkurson de Intervjuoj. Jen la verdikto:

1.a Premio. — Josefo de la Cruz, el Manresa.
2.a » Alfonso Tur, el Barcelona.
3.a » J. M.a Serrano Subietas, el Tarragona.



La urbestro de Molins de Rei afable salutas la Prezidanton de H. E. F.

4.ª » Ludoviko Serrano Pérez, el Sabadell,
5.ª » Pedro Nuez, el Barcelono.
6.ª » Fraŭ. Magencia García, el Barcelono.

La Premion «Nova Oratora Talento» atingis Sro. **Josefo María Serrano Subietas.**

La Premion «Plej Bona Anekdoto» oni aljuĝis al Sro. Josefo de la Cruz.

Ĉiu partoprenanto ricevis Esperanto-cindrujon.

Con objeto de facilitar la labor de la Secretaría y Redacción, se ruega que toda la correspondencia referente a asuntos que conciernan a BOLETIN, sea dirigida a la Secretaría de H.E.F. Las colaboraciones deberán venir escritas a máquina y en triplicado ejemplar, añadiendo la traducción correspondiente si estuvieran redactadas en Esperanto.

15 DE DICIEMBRE - DIA DE ZAMENHOF
DIA DEL LIBRO ESPERANTISTA

El Servicio de Libros de la Federación Española de Esperanto, en su deseo de prestar su mayor apoyo a la difusión de la literatura en Esperanto, y como homenaje al creador de nuestro idioma internacional, comunica a todos los esperantistas que todos aquellos pedidos de libros en Esperanto que sean hechos dentro de la segunda quincena del mes de diciembre, serán obsequiados con un 10 % de descuento.

UNESKO - NOVAĴOJ



EDUKMINISTROJ RAPORTAS PRI ANALFABETECO KAJ LINGVO-INSTRUADO

Edukministroj kaj altrangaj oficuloj el pli ol 80 landoj raportis en Genevo de 12 ĝis 23 julio pri la nuna stato de la edukado en la respektivaj landoj.

Informoj pri la jaro 1964-65 montris, ke en 22 landoj, kie edukado estas deviga, preskaŭ tute ne plu ekzistas anafabeteco. En 62 aliaj landoj tamen la analfabeteco restas la plej grava obstaklo al ekonomia, socia kaj kultura evoluo. En iuj kazoj ĝis 85 % de la loĝantaro estas analfabeta, kaj ĉe virinoj la proporcio ofte atingas ĝis 95 %.

Pri modernaj lingvoj: ĉiuj 85 landoj, kiuj respondis enketon de la Internacia Oficejo pri Edukado, deklaris, ke modernaj lingvoj estas devige instruataj en iliaj duagradaj lernejoj. Ĉe la plimulto temas pri nur unu lingvo; en 29 landoj oni instruas du lingvojn, kaj en kvin aliaj tri lingvojn devige. En 46 landoj la instruado de fremdaj lingvoj komenciĝas en elementaj lernejoj, kaj en kelkaj, eksperimente, en infanvartejoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

ARABIO MALPRROKSIMIĜAS DE AFRIKO

Britaj oceanografoj de la Internacia Hind-Oceana Ekspedicio eltrovis novajn indikojn, ke la Arabia duoninsulo grade malproksimiĝas de la Afrika kontinento. Ĝi trovis similajn trajtojn kaj norde kaj sude de la Adena Golfo. Sekiĝintaj riverujoj, kiuj finiĝas ĉe la suda marbordo de Arabio, rekomenciĝas en Afrika Somalujo. La disiĝado komenciĝis antaŭ pli ol 20 milionoj da jaroj kaj laŭŝajne pludaŭras je ĉirkaŭ du centimetroj jare. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

AFRIKO BEZONAS INSTRUISTOJN

Por helpi al afrikaj ŝtatoj varbi instruistojn por duagradaj kaj pli altaj lernejoj el eksterlando, Unesko eldonas en sia dokumento «Instruistoj por Afriko» detalojn pri vakantaj oficoj. Ĵus aperis la kvara eldono de la serio, kiu listigas vakantajn oficojn por la jaro 1965-66. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

METALOIDO POVAS ESTI GRAVA FAKTORO EN VIDAKRECO

Selenio, metaloido uzata en la fabrikado de fotoelektraj ĉeloj, kiuj ŝanĝas lumon en elektrimpulsojn, ludas esencan rolon en la vidado, laŭ sveda biologo, d-ro. M. J. Sirén, en la Lernejo de Veterinara Medicino en Stokholmo.

D-ro Sirén eltrovis, ke la kvanto de selenio en la retino estas proporcia al la vidakreco. Ĉe la kobajo, kiu havas malbonan vidkapablon, la procento de selenio en la retino ne superas tiun de la aliaj histoj —ĉ. 0,001 %. Ĉe la kapreolo kaj la ŝterno, konataj pro sia tre akra vido, ĝi estas centoble pli granda— 0,1 %.


Laŭ la nova teorio, mikroskopaj seleniaj lumriceviloj troviĝantaj en la eksteraj finaĵoj de la retinaj bastonetoj ŝanĝas la fotonojn (lumerojn) en elektrajn impulsojn. Ĉi tiuj, siavice, komunikiĝas al la cerbo, kiu interpretas ilin kiel lumon. Iuj riceviloj akceptas nur bluan lumon, aliaj nur verdan, aliaj ankoraŭ nur ruĝan —depende de la organikaj koloraĵoj, kiujn ili enhavas. Laŭ la eksperimentoj de d-ro Sirén, rodopsino («retina purpuraĵo') ludas rolon nur dum krepuska vidado.

Li nun intencas fari eksperimentojn per radiografia difrakto por konstati la kristal-strukturon de la selenio en la retino. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

AFRIKA CENTRO PRODUKTOS SUN-MOTOROJN

Fabriko por produktado de sun-motoroj estas starigita en Niameo en Nigero; financas ĝin kune la ŝtatoj Malio, Maŭritanio, Nigero, Senegalio kaj Supra Volto. Senditaro de Unuiĝintaj Nacioj antaŭ nelonge esploris la eblecojn doni al ĝi teknikan helpon.

Sun-energio estas uzebla por solvi la akvo-problemojn de la koncerna regiono: aŭ per funkciigo de motoroj por puto-borado aŭ per sensaligo de antaŭe netrinkebla akvo. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).



Niaj pioniroj...

Carlos Martínez Fernández

(Karolo)

Dum sia kampanjo por honori niajn pionirojn, «Boletín» havis la okazon trovi homojn apartenantajn al plej diversaj socitavoloj, al plej malsamaj kulturaj niveloj, kaj pro tio el plej diversaj opinioj pri la vivo, kio cetere ne estis baro por ke rilate la problemon kiun prezentas la disvastigo de la Internacia Lingvo ĉiuj mirige koincidis. Certe niaj amikoj konstatis tiun fakton legante iliajn respondojn al niaj kutimaj demandoj. La neskuebla fido de niaj pioniroj al la bazaj veroj de nia Movado estas forto kiu garantias la kontinuecon de la paciga kaj kleriga agado de Esperanto. Inter la «pacaj batalantoj» kiuj kun plena fido al nia idealo klopodis pri ĝia realigo oni devas enkalkuli nian samideanon Carlos Martínez Fernández.

Profesoro de diversaj E-kursoj ĉe la Reĝa Ekonomia Societo de Amikoj de la lando, en Sevilla, Sro. Martínez estis ankaŭ dum multaj jaroj Delegito de U. E. A. Dank'al lia entuziasmo, grupeto de urbaj policanoj por Turismo lernis Esperanton kaj kunportis sur la brako la rubandon kun la verda insigno.

En la jaro 1928, okazis en Sevilla la VIIa Kongreso de Esperanto kaj la organizinto de tiu nacia Kongreso estis nia kara pioniro. Dum tiu Kongreso okazis Literatura Konkurso kun la festo de Floraj Ludoj, kaj oni atingis de la Urba Konsilantaro la publikigon de belega gvidlibro en Esperanto. Nia pioniro profitis la okazon por informi pri Esperanto pere de la lokaj radiostacioj, kaj verkis diversajn raportojn pri Esperanto en la urbaj gazetoj. Li uzis kiel plumnomon la pseudonimon «Karolo».

Post tiu biografia skizeto nia samideano respondas al niaj kutimaj demandoj:

1.—*Kie kaj kiam vi kontaktis kun Esperanto kaj eklernis ĝin?*

En Sevilla, dum la jaro 1911a, mi legis en la lokaj gazetoj raportojn pri nova internacia lingvo «Esperanto», kaj tial mi komencis la lernadon de tiu idiomo; poste, mi divastigis ĝin en kelkaj Kluboj. Mi eklernis ĝin en la Reĝa Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando.

2.—*Kiu estis la ĉefa faktoro, kiu instigis vin lerni Esperanton?*

La kaŭzo de tiu decido estis ĉefe, ĉar de kiam mi komencis dum la junuleco studi en Instituto, ĉiam absorbis al mi la frata idealo de internacia kompreniĝo inter la homoj de la tuta mondo, eble per solvo de unu sola helpa, logika kaj facila universala lingvo.

3.—*Laŭ via opinio, kiu estas la ĉefa celo de Internacia helpa lingvo?*

Laŭ mia modesta penso, la nura objektikvo de internacia lingvo estas la frateco de la homaro, ĉar kiam oni renkontiĝas kun gesamideanoj de iu ajn lando, ili jam ne ŝajnas fremduloj, sed nur, loĝantoj de Esperantujo, ĉar ili parolas la saman idiomon, elpensitan de nia Majstro Dro. L. L. Zamenhof.

4.—*Kion vi —spertulo— konsilus al la esperantista aro por pliviĝligi kaj pligrandigi nian movadon?*

Nuntempe estas grava demando, pro la motivo ke la landaj gazetoj ne publikigas informadon pri Esperanto, kiel antaŭ pasintaj jaroj, kaj ankaŭ ni devas kulpigi la esperantistojn, ĉar la plej multo komencas entuziasme lerni la helpan lingvon kaj tuj forgesas ĝin, kaj samtempe, la gravegan esperant n movadon en sia lando kaj en la tuta mondo. La kaŭzo estas la ŝanĝo de aktikveco al la pasiveco.

"MALĜOJO EN L' ALEO"

M. de Elezcano
BILBAO.

Trista estas nun l' aleo
Sen verdaĵo, l' arbar' nuda;
Malĝojo en tutareo
Pro la vintro veter' kruda.

Mallonga temp' brilis ĉarmoj
Kiuj vestis dum somero,
Kaj nun, frostoj, pluvaj larmoj,
Kaj neĝ, estas nur sufero.

—Jen soleco kaj silento!
—Trista l' arbar senfolia!
Kelkafoje, akra vento
Siblas kun fort' energia!

—La tagoj kun nebul' trista . .
Kiel premas mian koron!
—Horoj langaj, ĝem' persista;
—Ho!, mi perdas bonhumoron.

LA PREĜO DE L'BIRDIDOJ

Saldanha Carreira

Sundio! Patro de ĉiuj vivaĵoj! Protektanto de la birdidoj! Per viaj helaj kaj varmaj radioj, benu nin!

Donu vivon plej sanan al niaj gepatroj, dum ni estas etuloj!

Se ili mortos, ve, kiu enmetos nutraĵon en nian tute malfermatan beketon?

Sundio! Patro de la birdidoj kaj de la homoj! Ne konsentu ke, dum nia dormado, la malbonaj knaboj prenu nin aŭ al ni ĵetu ŝtonojn, ĉar la farintoj de niaj ĥestoj kaj de ni mem estas malfortikaj, la nestoj facilrompaj kaj birdidoj facilmortaj!

Sundio. Forkonduku, for, for de nia loĝejo la manĝegemajn birdegojn ankoraŭ pli kruelaj ol la knaboj. Elkaŝu nian interplektitan hejmeton kontraŭ la rondaj, tre rondaj kaj fiksaj okuloj de la strigoj!

Ni estas ankoraŭ etuletoj, ni ne kantas, ni nur malagorde kripepas, sed kiam ni, de vi dorlotataj, fariĝos grandaj kiel panjo, ho, ni promesas tiam kanti, je via honoro, la plej dolĉajn, trilajn, la plej ĉarmajn, niajn plej gajajn melodiojn!

Sundio, benu nin!

Amen.

5.—*Post via longa vivo esperantista, kian mesaĝon vi transdonus al la nuntempaj esperantistoj?*

La ĉefa konsilo por la gesamideanoj estas ke, ĉiam, ĉie kaj ĉiel propagandu la lingvon Esperanto kaj ke en ĉiuj esperantaj kunvenoj kaj kongresoj nur oni parolu nian fratan helpan lingvon, por konvinki al la skeptikuloj, ke per tiu ilo, oni povas facile interrilati kun ĉiuj personoj, kio estas vera solvo por pacigi la Universon. Nuntempe, oni povus profiti la Televidon por organizi Kurson de Esperanto.

CURSOS DE ESPERANTO

El Grupo Esperantista de Bilbao ha organizado un Curso gratuito de Esperanto. Informes e inscripciones en Barrencalle Barrena, 7, 1.º, dcha., sede del Grupo.

Asimismo el Grupo Esperantista de Valladolid ha organizado un Curso de Esperanto que tendrá lugar en su domicilio social los martes y viernes de 8 a 9 de la noche, con una duración total de 30 a 35 horas.

Como en años anteriores, ha dado comienzo el curso de Esperanto para Graduados Sociales en la Facultad de Medicina y Ciencias de Zaragoza. Las clases están a cargo de la profesora doña Inés Gastón, Secretaria de H. E. F.

La Sociedad Esperantista «Frateco» de Zaragoza, ha organizado cursos de Esperanto que estarán a cargo de los profesores don José Martínez y doña Herminia Gil. Informes en el domicilio Social de «Frateco», calle San Vicente de Paúl, núm. 1.

Por la emisora Radio Popular de Málaga, de la Cadena Ondas Populares Españolas, instalada en Vélez-Málaga, ha comenzado a transmitir un curso de Esperanto el Secretario de «Hispana Esperanto Auroro», don Miguel Cazorla. La duración es de un cuarto de hora diario, de 16,45 a 17 horas.



Unua kunveno de la nova kurso 1965-66 de la membroj de Esperanto-Grupo VILLANUEVA Y GELTRU (Barcelono), en la Biblioteco Víctor Balaguer, nova ejo de la Grupo. Kiel dum la pasinta jaro, Pastro Jozefo M.ª Claramunt, Sch. P. estos la gvidanto de la kurso.

✱ *Ni legis por vi...*

HECHOS FUNDAMENTALES ACERCA DE LA LENGUA INTERNACIONAL (Esperanto). — Ivo Lapenna. — Eldonis H.E.F. Tradukis N. L. Escartín. — 7 pesetoj aŭ egalvaloro. Mendoj ĉe la Libroservo de H.E.F.

Ofte, iu el niaj amikoj, kiu aŭdis paroli pri Esperanto, diras al ni: «Mi ŝatus scii ion pri tiu afero». Ofte ankaŭ estas iu samideano kiu bedaŭras ne havi falion aŭ broŝuron kiu povas kontentigi la scivolemon de multaj amikoj kiuj demandas lin pri kio estas Esperanto.

Nun, tia neceso estas plenumita. H.E.F. eldonis belan broŝuron kiu enhavas la seriozan informon kiun verkis nia kara Prezidanto de U.E.A. Prof. Dro. Ivo Lapenna, okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, kaj tradukis en hispanan lingvon nia amiko la ĉefredaktoro de nia bulteno, Nicolás L. Escartín.

Oni elmontras tie, kiel kaj por kio Dro. Zamenhof elpensis la lingvon nomitan Esperanto, kaj kiel ĝi evoluis ĉar ŝi estas vivanta lingvo. Oni same montras la socian bazon de tiu lingvo, ĝian internaciecon, ĝian gravan rolon en la literatura mondo, ĝiajn praktikajn aplikojn, kelkajn respektindajn opiniojn pri ĝia valoro, kaj, fine, la proponon senditan al la O.N.U. subskribitan de centoj da miloj da subskriboj.

La broŝuro estas efika ilo por disvastigi la konon pri nia lingvo kaj pri ĝiaj celoj. Estas ankaŭ ilo por klarigi miskomprenojn kaj refuti malbonintencajn opiniojn. Restas nur unu afero: ke niaj samideanoj aĉetu la broŝuron kaj disvastigu ĝin. En nia bretaro, la broŝuro ne povas plenigi sian celon.

La prezo de la broŝuro estas tre malgranda. Eble, donaci ekzempleron al iu amiko ne supozas por iu ajn samideano pli granda elspezo ol donaci al li cigaron. Kaj tiu samideano povas tiamaniere kunhelpi al la disvastigado de nia kara lingvo, de niaj karaj idealoj.

M. SANCHO IZQUIERDO

JAPANA KVODLIBETO (de poemoj kaj prozaĵoj originale verkitaj en Esperanto). — Redakto de Miyamoto-Masao kaj Tazuo Nakamura. — Prezento de Clelia Conterno Guglielminetti. — STAFETO: Beletraj Kajeroj, 25. — *J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj,* 1965. — 12 x 18'5 *cm.* — 158 *paĝoj.* — *Prezo:* 1,25 *usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.*

Estis intenco de la eldonisto kunhelpi per ĉi tiu volumeto pri japanaĵoj la celebron de la 50a UK. en Japanujo, kaj certe li sukcesis: la varia enhavo de la libro certe agrabligos ĝian legadon dum kiu oni ne preteratentos la belan, modelan Esperanton. Belaj poezioj, interesaj rakontoj (la kortuŝan «al kara fratineto» de Hukuta Masao, prenitan el la realo, mi malfacile forgesos) kaj eseoj, konsistigas agrablan mozaikon literaturan. Tiu ĉi volumeto estas plua juveleto aldonita de STAFETO al nia literatura vivo. Estas speciale menciinda la prezento de Clelia Conterno Guglielminetti.

N. L. ESCARTIN

MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO. Nazimondo en Hungarujo. — Memorlibro. — Teodoro S. Ŝvac. — Antaŭparolo de J. Régulo. — Kovrilo de San Schaap, Jr. — STAFETO: Belliteratura Serio, 25. — *J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj,* 1965. — 16 x 22 *cm.* — 264 (8 *numeritaj* + 248 + 8 *bildo) paĝoj. Prezo:* 2,80 *usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.*

Maskerado ĉirkaŭ la morto estas, laŭ mia opinio, oportuna libro en Esperantujo, despli oportuna ĉar temas pri memorlibro de homo suferanta en propra karno kaj animo tiun lavangon de frenezo, doloro kaj honto kiu ruinigis parton de Eŭropo kaj grave skuis en kelkaj landoj la fortajn bazojn de la kristana civilizacio.

Sinjoro Ŝvac (budapesta advokato suferinta en Hungarujo la terurojn de la Nazimondo) estas plua rakontanto de teruraĵoj jam familiaj al tiuj, kiuj en anima solidaro kun la tiamaj suferintoj tralegis almenaŭ parton de la abundaj verkaĵoj aperintaj en ĉiuj lingvoj pri tiuj terurigaj amasmortigoj kun la espero —senespera— trovi ian eksplikon al tiu subhoma frenezo. Multaj krioj leviĝis post la tragedio kaj

sennombraj protestoj furiozis. El la plej tragikaj, rememoru la verkon de Rudolf Hochhuth «Der Stellvertreter», certe de multaj bedaŭrata sed kies apero eksplodigis plej diversajn kaj kontraŭajn opiniojn. Ankaŭ novan intereson vekiŝ la libro «Le Matin des Magiciens» kiu enportis kuriozan sed bone fundamentitan interpreton. Multaj aliaj voĉoj aŭdigis sin, sed jam multaj homoj forgesis la dramon aŭ misvaloras ĝin. Maskerado ĉirkaŭ la morto ŝajne celas esti atesta memoriga averta dokumento de tiu tragika historipeco.

La verkanto de la libro, konata esperantisto, sciis lerte spici sian rakonton per anekdotoj kaj humoraĵoj kiuj iel malpecigas la animon de la leganto, troŝarĝita per la tragikaj krudulaĵoj defilantaj tra la paĝoj de la libro. La rakonto estis originale verkita en Esperanto.

N. L. ESCARTIN

KAŬKAZAJ RAKONTOJ. — M. J. Lermontov. — Eldonis U.E.A. Tradukis D. Staritsky. — Moderna plasta kovrilo. — Prezio: 20 steloj. Mendoj ĉe U.E.A., aŭ Libroservo de H.E.F.

Ĉi tiun libron eldonis U.E.A. okaze de la 150 jara datreveno de la naskiĝo de M. J. Lermontov (1814-1841), unu el la plej grandaj rusaj poetoj, viktimo, same kiel Puŝkin, de kruda epoko, de socio primitiva kies ĝangala konscio kaŝiĝis sub rafinitaj kaj pompaj eksteraĵoj sed kies bruteco ebligis la mortigon, en la plej frua aĝo de la du plej bonaj rusaj poetoj: Puŝkin kaj Lermontov.

Kaŭkazaj rakontoj estas plaĉa libro enhavanta tri rakontojn (Bela I, II Maksim Maksimiĉ, kaj Tamanj) elektitajn el la abunda verkaro de Lermontov kaj tradukitajn el la rusa lingvo de la kompetenta esperantisto D. Staritsky. Ili tri temas pri aventuroj de juna rusa oficiro vojaĝanta tra la kaŭkazaj regionoj. La bela esperanto de Staritsky ŝajne brile redonas la prozan majstrecon de Lermontov. Kvankam la rakontmaniero aperas jam malnoviĝinta kaj mankas profundeco en la vivkonceptoj, la libro estas agrabla kaj amuza, kaj riĉigas nian tradukan literaturon. La aldonita bibliografio de la verkoj de Lermontov en Esperanto estas plua allogaĵo de la libro.

N. L. ESCARTIN



BELARTAJ KONKURSOJ 1966

U.E.A. denove invitas ĉiujn siajn membrojn kaj membrojn de la 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto partopreni la Belartan Konkurson. La kompleta reviziita regularo de la Konkurso aperis en la Jarlibro de U.E.A. 1965, Unua Parto, sur la paĝoj 132-4. Estas tre konsilinde atente tralegi la regularon antaŭ forsendo de la konkursa materialo.

Kiel en la lastaj jaroj la ĉijaraj branĉoj estas jenaj:

Originala poezio
Tradukita poezio
Originala prozo
Originala dramèto (por scenejo, televido aŭ radio)

Ĉiu konkursanto povas partopreni nur per tri konkursaĵoj (tajpitaj en 4 ekzempleroj) en ĉiu branĉo, antaŭe ne aperintaj en presformo.

Konkursaĵoj laŭ la regularo oni sendu al la Sekretario de la Belarta Konkurso s-ino Emilija Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio. La limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de marto 1966.

GRAMATIKAĴOJ

PRI LA PREPOZICIO «DA»

La esprimo «dum la frua parto *da* la jaro» ŝajnas al mi nebona; mi preferas «*de* la jaro»; ĉar en la dirita frazo la vorto «parto» signifas ne mezuron, sed nur limigitan apartaĵon. Tiel ekzemple «monato» estas parto da tempo, ĉar ĝi esprimas simple mezuron, sed «Januaro» estas parto de jaro, ĉar ĝi esprimas ne mezuron, sed difinitan limigitan apartaĵon; «kvaronjaro» (= mezuro) estas parto *da* jaro, sed «printempo» (= speciale montrita parto) estas parto *de* jaro. Oni devas memori, ke «parto», «peco» k.t.p. havas la sencon de mezuro *ofte*, sed ne ĉiam. Dum la vorto «da» (kiu havas kaŝite la sencon de «ia») montras, ke ni parolas pri *kvanto* da ia aĵo, sed ne pri ĝia individueco (ekzemple peco da viando = peco da ia viando), la artikolo «la» montras, ke ni parolas pri objekto individue *difinita* (aŭ pri ĉiuj objektoj de la sama speco), de kiu ni prenas parton (ekzemple «peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi»); tial ni povas diri, ke, kvankam *teorie* la combinado de «da» kun «la» ne estas malpermesata, sed (tamen) en la *praktiko* tia kombinado estas uzebla nur en tre *maloftaj* okazoj, tiel malofte, ke ni eĉ povas simple konsili, ke oni neniam uzu «da» antaŭ «la» (krom la okazoj, en kiuj la senco tion ĉi nepre kaj tute sendube postulas).

(EL LINGVAJ RESPONDOJ — Zamenhof)



EL ESPERANTO

«Los que aspiramos a crear un mundo mejor, tenemos que mirar con simpatía y benevolencia todo esfuerzo legítimo que vincule a los hombres en una unidad que esté por encima de todo lo que separa y aleja.

Entre los medios naturales en que se asienta esta deseada unidad el más importante, quizá, es el lenguaje que pone a los hombres en inmediato contacto entre sí. Un lenguaje nuevo y universal podría obtener este objeto.

Por eso vemos con suma complacencia el Esperanto, que reúne todas las condiciones requeridas, sin tocar para nada los idiomas ya existentes, cargados de belleza y de gloria.

Por estos motivos hacemos votos para que el esfuerzo que se hace en pro del Esperanto tenga pleno éxito, y encuentre en las organizaciones que influyen en la cultura del mundo el apoyo a esta noble empresa; así lo esperamos con la ayuda de Dios.»

† ANTONIO M.ª CARDENAL BARBIERI
Arzobispo de Montevideo

— Por cortesía de la Urugvaja Esperanto-Societo.

XXVII HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La Estraro de H.E.F. en interkonsento kun la Estraro de la Esperanto Grupo de Bilbao, decidis okazigi en ĉi tiu urbo la 27an Kongreson de Esperanto, en la monato julio 1966.

Forpasis...

La 24an de oktobro ĉijara forpasis en Burgos Sinjorino Ana Felicia García Roa, edzino de nia samideano Sro. Pedro González Cantero.

Al nia samideano kaj familio nian plej sinceran kondolencon.

Niaj Grupoj:

ESPERANTO GRUPO DE VALLADOLID

La 8an de la monato Oktobro komenciĝis kurso de Esperanto kun ĉeesto de dekses novaj gelernantoj; la kurso kiu okazas marde kaj vendrede estas gvidata de sro. Cantalapiedra.

Kun la celo altiri al pli ofta ĉeesto de la membroj al la sidejo de la Grupo komencis la 4an de Novembro serio de prelegoj. La unuan faris la konata samideano A. Gamboa, kiu kun sia tradicia bonhumoro kaj en tre bona esperanto parolis pri «LA NIGRA ARBARO». En sia parolado Sro. Gamboa rakontis siajn travivaĵojn en la germana teritorio de tiu nomo. La preleginto estis prezentita de la Prezidanto kaj, malgraŭ la fakto ke ĝi okazis en tago de neordinara kunveno, ĉeestis kelkaj dekoj da personoj, inter ili kelkaj ne esperantistoj.

L. HERNANDEZ

Mendu jam:

Belajn kristnaskajn plurkolorajn kartojn. 2,00 ptoj. po 1 ekz.
Faldformitaj, 2,50 ptoj. po 1 ekz.
Faldformitaj, kun koverto 3,00 ptoj. po 1 ekz.
Mendoj: ĉe Inés Gastón, Sekretariejo de H. E. F.
Marina Moreno, 35, 4.º, dcha. ZARAGOZA.

Deziras korespondi...

POLLANDO.—Warszawa, Styki 27 m 4. S-ro. Adam Penconek, sciencisto interesiĝanta pri Hispanujo, precipe pri ĝiaj kulturo kaj historio, deziras korespondi kun ĉiuj volontuloj.

POLLANDO.—Swindnik k. Lublina, ul. J. Stowachiego 11 m 13. S-ro. Inĝ. Wactaw Nastaj deziras korespondi kaj Interŝanĝi pmk. kun hispana amiko, li bezonas pmkn. de Hispanaj kolonioj.

JUGOSLAVIO.—Beograd, Cvijiceva 84.ª, S-ro. Ranko Gavranovic, 22 jaraĝa deziras korespondi kun hispana samideano kaj interŝanĝi pk-jn. por ekkoni nian landon kaj popolon.

HUNGARUJO.—Budapest-VI, Lovag u. 15. F-ino. Suzanna Vajay 24 jaraĝa, oficistino deziras korespondi kun junulo. Ŝi kolektas pmjn. kaj replikojn de famaj pentristoj. Ŝin interesas la belaj artoj, natursciencoj kaj ŝi tre ŝatas muzikon.

HUNGARUJO.—Budapest. Rakoscsaba, Harsona u. 85. Fraŭ. Maria Bekesi. 18 jara studentino, kunlaboranto kaj aktivulo de la Esp. Foto-Film informa servo, kultura propaganda kaj redakcia servo de Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofono amatoroj, deziras korespondis kun interesitoj pri la sama temo.

HUNGARUJO.—Budapest. X. Liget-utca 2. Fraŭ Etelka Kelemen. 22 jara ĉarma hungara junulino deziras kontaktiĝi kun interesito pri gitaro kiu iel povus helpi ŝin en la lernado de tiu instrumento. Kolektas ĉion pri gitaro.

HUNGARIO.—Budapest 119. Postafiok, 6. Sro. Arpad G. Pölöŝkey. Ĉefredaktoro de Esp. Foto-Film Informa Servo, deziras organizi reton de interesitoj en la tuta mondo. Li serĉas ĵurnalistajn geamikojn kun kiuj fari regulan kontakton por komuna informado. Petas bonkvalitajn fotojn 9 x 12 pri Esperantista-Turista-Kampadista vivo en Hispanujo. Ankaŭ la Klubo «La Espero» (Budapest XI, Puskas Tea 13, Hungarujo), serĉas multajn gekorespondantojn en ĉiuj urboj (Esp. Filatelistojn).

HUNGARUJO.—Wezobereny, Martinovics 2. Johans Karobji, komencanto, deziras korespondi kaj inteŝanĝi b.k. kaj pmkn.

SKOTLANDO.—Edinburgh 12, 1.ª Cralgs Avenue. S-ro. James B. Mackay, sesdek jaraĝa, deziras interŝangi leterojn kaj sonbendojn.

POLLANDO.—Warszawa 4, ul. Radzymiúska 34 m 18, Aldona Kobylinska, deziras korespondi pri historio, literaturo kaj ankaŭ interŝangi esperantajn librojn pmjn. kaj produktoj de popola arto.

POLLANDO.—Sulechow, ul. Przemystowa 28/6, woj. Zielona Góra, Korzeniewski Czestaw, 16 jaraĝa, studento Technikumo Ekonomio Akra, deziras korespondi kun hispana samideano.

Ĉiu, kiu skribos rekte al la Redakcio de Pola Radio (Polskie Radio I Telewizja — Esperanto Fako — Warszawa, Pollando) ricevos senpage belajn kolorajn programfoliojn.

ESPERANTUJO 1966

La Esperanto «FOTO-FILM informa SERVO», kultura, propaganda, redakcia servo de la INTERNACIA LIGO de ESPERANTISTAJ FOTO-KINO-MAGNETOFONAMATOROJ, /: kunlaboranta fakasocio de UEA:/ serĉas por sia 1966-jara kultura kaj arta programo seriozajn kunlaborantojn, aktivulojn el la tuta mondo.

Sub la titolo ESPERANTUJO 1966 ni deziras organizi kulturan kaj artan festivalon dum la tempo de la 51a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto Ĝi okazos verŝajne en la moderna kulturejo de la NAPSUGÁR/Sunradio/Kultura kaj Arta Esperanto Klubo de HEA.

Ni petas ĉiujn gemembrojn de ILEF-movado kaj ĉiujn esperantistajn foto, kino kaj magnetofonamatorojn de la mondo, bonvolu amase partopreni la organizan laboron, kaj bonvolu sendi al ni konsilojn, proponojn, fotoraportojn pri la esperantaj eventoj, aranĝaĵoj kaj pri aliaj aferoj de la movado. La mezuro de la fotoj estu 9 x 12 cm.

La Organiza Komitato de EFFS akceptas kun danko la propon-leterojn por la komuna laboro.

Ni petas adresi la sendaĵojn al:
Esperanto «FOTO-FILM informa SERVO» de ILEF-movado,
Budapest, P. O. 119, Poŝtafako 6, Hungarujo, Eŭropo.

Con gran satisfacción recibimos el folleto HISPANIO POR VI, y sabemos que la Subsecretaria de Turismo lo ha enviado amablemente a diversas Asociaciones, Instituciones y personalidades del mundo esperantista.

Seguramente todos o la mayoría de los esperantistas españoles conocen el texto original de este folleto, pero por si alguno no lo conoce, diré que se trata de un librito de 72 páginas, ilustrado con un sin fin de graciosas viñetas, y escrito con un fino humorismo que hace verdaderamente grata su lectura.

De la traducción al Esperanto, ¿Que voy a decir? El nombre del traductor N. L. Escartín es la mejor garantía de que es muy buena.

Y ahora un consejo: solicitad el folleto HISPANIO POR VI en la Oficina de Turismo de vuestra localidad y enviadlo a vuestros corresponsales, estoy segura de que os lo agradecerán y daréis a conocer España en forma original y agradable.

Inés Gastón

ĜOJAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVAN JARON

DIVAGACIONES ACERCA DEL HOMBRE POSIBLE

Nicolás L. Escartín

— En las entrañas del ser hay un hombre superior posible. Es característica suya el cambio en la percepción del sentido del tiempo.

—o—

— No es como el hombre ordinario, ni está donde está aquél, y, sin embargo, no es diferente en lo externo. Ha logrado aquello que los demás creen tener. Ha generado en sí algo que le ha revelado su real existencia y transmutado su interna naturaleza.

—o—

— Y su ser transitorio, encerrado en los sentidos, se ha liberado y convertido en *sustancia eterna.*

—o—

— Y puede tener consciencia del «cuerpo largo de su vida», situado fuera del tiempo.

—o—

— Y su nacimiento, y su muerte, y su entera vida, yacen en un mismo punto fuera del tiempo. Su «espacio sicológico», producto de una nueva relación interna, es su mundo de percepción. Sin embargo él mora aquí, puede hablarnos, e incluso parecernos vulgar y trivial. Su conocimiento es empero comunicable, pero muy pocos quieren saber de él.

—o—

— Porque el hombre ordinario no quiere saber. Prefiere creer. Porque también hay un creer intelectual, sucedáneo del conocimiento, que puede obtenerse a bajo precio.

—o—

— El hombre ordinario no es una unidad: es una diversidad de funciones autónomas que imposibilitan el acto total. En él, la voluntad está separada del conocimiento, sus sentimientos de su intelecto. Al hablar de él podemos hablar del hombre desintegrado, pero jamás del hombre integrado, es decir del hombre superior posible.

—o—

— Porque el hombre superior posible es un hombre integrado, pero realizar esta integración es imposible al nivel de conciencia del hombre ordinario. Y es necesario entender que este hombre superior posible no es un hombre ordinario mejor (sea cualquiera el grado de perfecciones de sus *facultades ordinarias*), sino *otro hombre, otra sustancia.*

—o—

— Y, quizás tú, lector, encierras en ti a este hombre posible, y, sin saberlo, le niegas la expresión.

TIP. C. BOLOIX.-REINA FABIOLA, 7.-ZARAGOZA

D. L. Z - 375 - 63